**LEA vizitis Bruselon.**

Laŭ peto de LEA, la Bruselo Esperanto grupo organizis promenadon en Bruselo kaj ankaŭ aliuj volonte aliĝis. Estis dimanĉo kaj en la stacidomo bonvenigis nin Bernard-Régis, Tabatha kaj Ekatarina el Bruselo. Patrick venis de Gento kaj rakontis pri sia vojaĝo en Nepalo al Eliane el Lieĝo kaj mi. Kaj An, Henry kaj Emilio alvenis kune de Limburgo (LEA) precize je la 11-a horo kaj duono.

Feliĉe estis seka vetero kun suno iom varma, kiam ni estis en la lumo. Sed malvarma en la ombro aŭ vento. Ni do restis pli longe por rigardi kiam ni estis en bonan temperaturon aŭ kiam la mirindaĵoj demandis pli da klarigoj. Mi observis, ke B-R. simple rigardis sur la muroj por sciigi la datoj de gravaj eventoj. Ankaŭ tion mi lernis: mi ne plu bezonos multe peni por memori ilin. Ni do marŝis rapide, aŭskultante, rigardante, babilante, ridante, en bona etoso.

Ni komencis malsupreniri laŭ la deklivo ekde la centra stacidomo, admirante la Smurfojn sur plafono de arko antaŭ la Preĝejo de la Madeleine, kies parto estis translokigita tie, ni lernis. Iom pli for ni admiris la belecon de la malnova sed luksa Galerio de la Reĝino, kaj iris ĝis la statueto de Janneke Pis, kiu senĝene daŭriĝis pisi. Tiam ni forkuris kiel ŝtelistoj dum la Inkvizicio, trakurante la mallarĝan Rue des Bouchers kaj la drinkejon de la Pupoj Teatro Toone, enirante tra unu pordo kaj elirante tra alia, preskaŭ rekte sur la Granda Placo. Tie Bernard-Régis priskribis la enon de la studenta nokta-trinkejo « La Ĉerko », kaj tio provokis eta krio de timo pri hororo.

Sur la Granda Placo, Foto! kaj kelkaj minutoj por karesi T'Serclaes… bonajn dezirojn…

Bernard-Regis bone konas la urbo kaj klarigis multe, sed ne rezervis tablon. Tio lasis al ni la liberecon elekti tiun, kiu plej bone konvenis al niaj naŭ apetitoj : en la strato de pitoj, surbaze de la sperto de Tabatha, ni havis sufiĉe da loko. Ni manĝis greke, gustumis retzinan vinon, grekan kafon, kaj Ekatarina el Bruselo mendis dolĉegajn dolĉaĵojn, ke ni finfine dividis inter ni.

Kaj tiam ni devis decidi : ĉu ni havis sufiĉe da tempo por unu aŭ du muzeo vizitojn ? Oni kalkulis : jes ja eblis fari la du ! KBR (Nacia Biblioteko) kaj la Muzeo de Muzikinstrumentoj.

Fakte, ambaŭ prezentas altvalorajn kaj mirindajn objektojn en agrabla maniero. La biblioteko montris al ni tre dikajn librojn, skribitajn antaŭ 300, eĉ 400 jaroj. Feliĉe ni ne vivas en tiu tempo. Imagu ke vi sidas sur la benko kun libro de 10 kilogramoj sur la genuoj ! Ankaŭ la muzeo de muzikinstrumentoj estis tre interesa. Ĝi montras muzikinstrumentojn sur 3 etaĝoj. Klavaro instrumentoj, tre malnovaj instrumentoj kaj instrumentoj el la tuta mondo. Kun eta aparato, ni povis aŭskulti la instrumentojn.

Post tiu vizito, kelkaj bedaŭrinde jam devis foriri. La aliaj ankoraŭ trinkis kafon aŭ ĉokoladon. Daŭriĝis en tute 5 horojn kaj duono de plezuro revidi nin, ekkoni Ekatarina (el Ruslando !),

paroli Esperante inter ni kaj, kiel planite, pli bone koni la centro de Bruselo. Dankon LEA ! Kaj dankon al la Brusela klubo, ĉefe Bernard-Régis. Vivu la vivo !

Marilyn Droog.